

6a PASKA DIMANĈO - la 5-a de majo 2013-a

La Sankta Spirito rememorigos al vi ĉion, kion Mi diris al Vi.

- Komento al la Evangelio de P. Alberto Maggi, OSM

El la evangelio laŭ Johano 14, 23-29

En tiu tempo Jesuo diris al siaj disĉiploj: „Se iu amas Min, li observos mian vorton, kaj mia Patro amos lin. Mi venos kun mia Patro al li, kaj ĉe li Ni restos. Kiu ne amas Min, ne observas miajn ordonojn. Kaj la vorto, kiun vi aŭdas, estas ne mia, sed de la Patro, kiu sendis Min.

Tion Mi diris al vi, dum Mi estis ĉe vi. Sed mia Patro sendos al vi en mia nomo la Sanktan Spiriton, kiu instruos vin pri ĉio, kaj rememorigos al vi ĉion, kion Mi diris al vi.

Pacon Mi lasas al vi, mian pacon Mi donas al vi. Mia paco ne estas kiel tiu, kiun la mondo donas. Ne maltrankviliĝu via koro, nek senkuraĝiĝu.

Vi aŭdis, ke Mi diris al vi: Mi foriras, sed Mi revenos al vi. Se vi amas Min, vi devus ĝoji pro tio, ke Mi iras al la Patro, ĉar la Patro estas pli granda ol Mi. Ĉi tion Mi diris al vi nun, por ke vi kreu, kiam ĝi okazos.”

La evangelio de ĉi tiu dimanĉo, je la ĉapitro 14-a de Johano, enhavas linion, la 23-an, kiu per si mem, se oni komprenas ĝin, ŝanĝas la rilaton al Dio, la koncepton pri Dio, kaj sekve la rilaton kun aliaj.

Kiu estas ĉi tiu linio? Jesuo diras: "*Se iu amas min, li observos mian vorton kaj mia Patro amos lin kaj ni venos al li kaj ĉe li Ni restos*". Kion volas diri Jesuo? Ĉi tiu ne estas promeso de Jesuo por la transmondo, sed ĝi estas la respondo de la Patro al sinteno havita en ĉi tiu vivo. Fakte Jesuo diris: "Se iu obeas mian vorton".

La aliĝo al Jesuo estas nedisigebla de lia mesaĝo de amo por la homo, kiun Jesuo igis klara en la sola ordono, kiun li lasis al sia komunumo: la vorto de Dio ne aperas en unu skribo, sed en la vivo, ne en la leĝo sed en la amo.

En la Eliro Dio metis sian loĝejon en tendon meze de la popolo, kaj li marŝis kun la popolo kaj gvidis ĝin al la libereco. Poste Dio estis kvazaŭ kaperita de la pastraro kaj metita en templon, kien ne ĉiuj povis eniri. Kelkaj estis forbaritaj kaj tiuj, kiuj estis akceptitaj, estis akceptitaj nur je difinitaj kondiĉoj laŭ difinitaj ceremonioj kaj ĉefe per pagado de impostoj kaj oferoj.

Ĉe Jesuo Dio forlasis definitive la templon kaj , kiel skribis Johano komence de sia evangelio, "metis sian tendon inter nin". Komenciĝis nova Eliro, tio estas nova marŝo al la liberiĝo, kie ĉiu disĉiplo de Kristo iĝas lia dia loĝejo.

La homo igis Dio sanktega pere de la komunikado de lia Spirito. Dio nun sanktigas la homon. Ne ekzistas sanktataj medioj ekster la homo. La sanktigado de la homo plenumita de Jesuo, do, malsanktigas ĉion tion, kion antaŭe estis konceptata aŭ trompmontrata sankta.

Dio ne estas realaĵo ekster la homo aŭ malproksima de li, sed ĝi estas interna kaj nun ĝi havas nomon: Patro. Dum la rilato kun Dio bezonis peradon, la intimeco de la kredanto kun sia patro, kun la Patro, igas ĝin nenecesa.

Dio petas pastrojn incensantajn, la Patro de Jesuo petas nur filojn similantajn al li, ne nur subulojn sed kunlaborantojn, ne piulojn psalmantajn sed kuraĝajn homojn. Kiam la homo komprenas ĉi tion, la rilato al Dio ŝanĝiĝas, la homo komprenas, ke Dio ne ensorbas la homajn energiojn, sed transdonas siajn energiojn, temas pri Dio, kiu ne malpliigas la homon, sed kiu potencigas lin, kaj ĉefe Dio ne petas la homon, vivi por Dio - kaj ĉi tio

estas tipa por religioj - sed ke la homo vivu el Dio, kaj ke li estu kun li kaj kiel li portanto de ĉi tiu ondo kreskanta de vivo kaj amo por la tuta homaro.

Ĉi tiu estas la ordono transdonita de Jesuo kaj ĉi tiu estas la instruo, kiun la evangeliisto Johano transdonas al ni. Farante tion, la homo spertas, ke la aliĝo al Dio ne malpliigas lin, sed potencigas lin kaj eniras ĉi tiun projekton de la kreinto, komuiki la vivon al ĉiu homo.

Kaj kiel li faras tion? Igante la homon la videbla sanktejo, kie aperas lia amo kaj lia mizerikordo. Temas pri dio, kiu ne petas oferojn de la homo, sed kiu ofertas sin por la homo kaj petas al ĉiu homo, akcepti lin por kunfandiĝi kun li kaj iĝi la vera sanktejo, el kiu elradias lia amo, lia mizerikordo kaj lia kompato.

Dum en la antikva sanktejo homoj devis iri je difinitaj kondiĉoj, nun estas la kredanto, la komunumo, la nova sanktejo, kiu iras al aliaj, sed ĉefe al la malproksimaj, al la forpuŝitaj, al la forigitaj kaj al la rifuzitaj.

Ĉi tiu estas la bona novaĵo portata de Jesuo en ĉi tiu dimanĉo.